# *Raúl Castro bonvenigas la prezidenton Miguel Díaz-Canel en Havano.*



Havano, 15 nov (RHK) La unua sekretario de la centra komitato de la komunista partio de Kubo, la generalo de armeo Raúl Castro, akceptis frumatene en Havano, la prezidenton de la ?tata kaj ministra  konsilantaro, Miguel Díaz-Canel kaj la delegitaron kiu akompanis lin en ties internacia turniro.

Dum tiu ?i turniro la prezidento plenumis oficialan laborprogramon en Rusio kaj kvar aziaj landoj, nome, en  la popola demokratia respubliko de Koreio, ?inio, Vjetnamio kaj Laoso, plus du teknikaj haltoj en Francio kaj Britio.

En la internacia flughaveno José Martí, Raúl Castro kaj José Ramón Machado Ventura, dua sekretario de la partio, plus Salvador Valdés, unua vicprezidento, bonvenigis la prezidenton, kiu plenumis tre sukcesan turniron internacian.

Díaz-Canel renkonti?is kun ?tatestroj, entreprenistoj, amikoj de la solidareco kaj kubanoj, kun la celo plifortigi la reciprokajn rilatojn amikajn.

Aliflanke, estis sciite ke gravaj interkonsentoj estis subskribitaj pri ekonomia kaj teknika kunlaboro, anka? en la energetika bran?o, industria, sporta, interalie, la? raportis la nacia informagentejo ACN.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/176610-raul-castro-bonvenigas-la-prezidenton-miguel-diaz-canel-en-havano

**Radio Habana Cuba**